

Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe,

Feliĉa veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Rompiĝas nebuloj
 Sub hela ĉielo,
 La timan ligilon
 Malligas Eol'.
 Susuras la ventoj,
 Ekagas ŝipistoj.
 Rapide! Rapide!
 Disiĝas la ondoj
 Kaj alproksimiĝas
 La ŝip' al la land'!

...

Glückliche Fahrt

Die Nebel zerreißen,
 Der Himmel ist helle,
 Und Äolus löset
 Das ängstliche Band.
 Es säuseln die Winde,
 Es rührt sich der Schiffer.
 Geschwinde! Geschwinde!
 Es teilt sich die Welle,
 Es naht sich die Ferne;
 Schon seh ich das Land!

...

Johann Wolfgang von Goethe, Johann Wolfgang von Goethe,

Feliĉa navigado

tradukita de Richard Schulz

Nebuloj ŝiriĝas.
 Serenas ĉielo.
 Timeman rubandon
 Malnodas Eol'.³
 La ventoj klopodas.
 Vigligas ŝipestro.
 Rapide! Rapide!
 La ondo disiĝas.
 La for' proksimiĝas.
 Aperas la land'.

...

Feliĉa veturo

tradukita de Wilhelm Barnickel

Nebul' disŝiriĝas,
 Ĉielo heliĝas.
 La timan ligilon
 Malnodas Eol'.
 Susuras la ventoj,
 Ekagas ŝipistoj.
 Rapidu! Rapidu!
 La ondoj partiĝas,
 La for' proksimiĝas.
 Vidiĝas la land'.⁴

...

³Rikardo Ŝulco skribis origine:

Eolo malnodas

Timeman ruband'.

(Sed tio estas gramatike malĝusta. Devus teksti "Timeman rubandon". M. Retzlaff)

⁴Sinjoro Barnickel origine skribis:

Jam vidas mi land'.

(Sed tie mankas la akuzativa formo "landon".)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

MR.-102-2 / Arg-268-541 (2004-09-09 09:12:59)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

Arg-268-542 (2013-02-26 15:11:56)

Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, ki-un eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Minden). La trian kaj kvaran liniojn de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto “malnodas” oni devus uzi la akuzativan formon “rubandon”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de WILHELM BARNICKEL (*1921-09-02) en 1983.*

Arg-268-544 (2013-07-20 12:20:36)

Tiun ĉi poem-tradukon sendis al mi, Manfred Retzlaff, en 1984 mia fervojista kolego Willi Barnickel (Tiroler Str. 12b, D-60596 Frankfurt am Main, Germanujo). La lastan linion de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 pliĝustigi; ĉar s-ro Barnickel erare neglektis, ke post la vorto “vidas” oni devus uzi la akuzativan formon “landon”. Kaj la akuzativa finaĵo “-on” ne estas elizebla (ellasebla).